GISTO – NOV – 2001
VASKE, Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Senpage disdonata dum la
Verda Kafo – Tutty's – POA

AVERTO!

Grava danĝero minacas nin. Ĉiuj eble jam legis sed turnis la paĝon sen pripensi la staton de nia spacoŝipo Tero. Validas rememorigad...adi ĝis enuo, ke milaroj da hektaroj da fekunda grundo perdiĝas ĉiujare. Pro erozio kaj, ĉefe pro la ĉirkaŭmedia varmiĝo, kaŭzata de fumo far incedioj kaj, minimume, du miliardoj da cigaredoj fumataj en ĉiu tago. Aldoniĝas ke, pro malatento al ĉi minaco, milionoj da ventkapuloj "fabrikas" buŝojn kiujn ili ne kapablas nutri. BV observi la sekvajn ciferojn: Laŭ la demografia horloĝo de ONU, la homaro kalkulis 5.681.584.670 da homoj. Pasintan jaron. La mondo ricevas ĉiutage 225 mil novajn enloĝantojn, t.e.= 93 milionojn jare... naskiĝas tri beboj en ĉiu sekundo. Timiga malprudento. De multaj jaroj religiuloj, ĉiam optimisme predikas, ke Dio zorgos pri la problemo. Nur en Brazilo almenaŭ cent milionoj da homoj fervore preĝas, ke Li helpu la nordorientanojn sed jaro post jaro la manko de sufiĉa akvo pli akriĝas. Neniel helpas nin nur preĝi. Jen ekzemplo: Kiam la edzino de Roberto Karlos gravege malsanis kaj baldaŭ mortonta, multaj milionoj da brazilanoj ŝiaintece preĝadis...vane. Do, laŭ tio, por savi la Teron ne sufiĉas preĝi, ke sindonaj homoj zorgu pri ĝi. Ĉiu ŝuldas fari iom, staĥanove, por helpi teni almenaŭ la nunan staton, ĝis pli prudenta homaro regos la mondon. Sed, vi eble demandos: kion mi sensignifa unuopulo povas/devas fari? - Eluzi ĉiun oportunon en sia vivo por konsciigi nelegemajn homojn pri la troloĝateco, kiu kaŭzas , kune kun la ŝrumpiĝo de fekundaj areoj, inflacian prezaltiĝon, mizeron. Sed, al kiu interesas la ekzisto de multaj loĝantoj? – al industriistoj, komercistoj kaj ne laste al ekleziuloj. Multaj konsumantoj plie riĉigas la riĉulojn. Multaj anoj potencigas la plurajn ekleziojn, per donacoj kaj lukro. – Ni ĉiuj devas ankaŭ alskribi ĵurnalojn per etaj leteroj enhavantaj avertojn kaj konsilojn, kiel teni nian karan mondon viva.

GISTERO

Jes, vere, ero el Gisto iam estis legita dum Leterkesto, kiam øi voæigas leterojn en la ĈRI-programo. Tamen, nuntempe, pro QSB=fado, ties signalon oni malofte aýdas komforte, kiel kutime kaj æiujare dum la trairo de vintro al printempo.

PETROBRAS

UEA-membroj, kiuj regule legas la oficialan organon, ricevis tre agrablan surprizon. Duono de ties lasta paĝo publikigas ekologieman PETROBRAS-anoncon. Al ĝi mi sendis ĉisuban leteron:

Sou admirador da nossa querida PETROBRAS desde o tempo de "O petróleo é nosso". Foi surpresa muito agradável para os esperantistas gaúchos constatar que a alta direção dessa Empresa reconhece o verdadeiro objetivo, pelo qual o Esperanto luta há mais de cem anos, publicando um "big" anúncio no órgão oficial da UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO de setembro-2001.

Sendis Georgo Esperanto, 880 95760-000 SSCaiurbo,RS



G. Esperanto-Asocio
Cx. Postal, 815
POA
90001-970

Georgo

Como esperantista veterano, de certa forma represento a comunidade gaúcha que pratica o idioma neutro internacional, quero manifestar por este meio um generoso agradecimento à PETROBRAS, por usar as páginas da revista ESPERANTO para associar seus produtos com a preocupação de zelar pelo meio ambiente. Capto o ensejo de parabenizar pelo êxito do TAMAR e o programa de multiplicação do PEIXE BOI ! Encanta-me o elevado grau de conscientização alcançado entre o povo da região.

Espero que continuem encarregando o periódico esperantista, que circula em mais de 100 países, para ofertar seus bons produtos.

Com saudações antecipa agradecimentos,

ŜAJNO TROMPAS

Kaiurba ĵurnalo publikigis spritan "estorieton" (kial ne oficialigi la vorton ESTORIO same kiel storry/history - Estória/história ? - Nu, jen ĝi, kurtigite: Kutime famaj pentristoj ankaŭ amindumas kun drinkaĵoj. La uloi estis edziĝinta al belega fraŭlino sed, laŭ la tempopaso ŝi perdis la ĉarmon. Ju pli ŝi malbeliĝis, des pli la artisto seniluziiĝis ĉiufoje kiam li alvenas hejme kaj revidas sian dumvivan kunulinon pli kaj pli hida. Iam, post kiam li revenis el longa bierumado lia menso insistis bildigi ŝin bela kiel en la tempo kiam ŝi estis raviga fraŭlino sed malgraŭ lia persistado, li daŭre nur vidis faldojn kaj amason da pendhaŭto. Li decidis pentri la du sur unu sama portreto. Jen, sube, kio rezultis. (Turnu ĝin).